Sed ni pensu, speciale nun, pri tiuj kiuj estas izolitaj; pri tiuj niaj amikoj-samideanoj en foraj landoj, kiujn ni eble renkontis unu fojon ĉe UK aŭ dum vizito, sed poste ne revidis. Kaj, pro homa naturo, eble neniam plu korespondis, neniam sendis bondezirojn de la sezono.

Kaj ni en Usono - la misiuloj de Esperanto, kiu obstine portadas la torĉon de la Zamenhofa Donaco al la Mondo, en lando kiu ankoraŭ ne agnoskas la valoron de tiu donaco - ni speciale devus ne perdi kontaktojn kun tiuj, eĉ izolitaj, samideanoj kies koroj batas laŭ la sama Esperantista takto kiel la niaj. Rekontaktu malnovan amikon hodiaŭ, sendu mesaĝon elkoran al tiu preskaŭ-forgesito; gratulu, ke tiu restas Esperantisto, kaj ĝoju, ke vi mem estas ano de Esperantujo.

Elkorajn bondezirojn je la sezono sendas al vi ĉiuj Lucy kaj mi, kun espero ke la nova jaro portos al vi bonan sanon, kontenton, kaj ĝojon.

Bill Harmon

**ASTERIKS LA GAŬLO.** Teksto: Gosciny. Ilustraĵoj: Uderzo. Esperantigis: diversaj sennomaj herooj. Kosto: \$7.00. Grandeco: 48 paĝoj grandformataj. Bindita. Bildstria rakonto, multkolora.

Tempestis la nokto. Kanonadis pluvo sur la tenda tolo. Interne sidis Julio Cezaro en la lumo de lanterno. Penseme li metis plumon sur pergamenon:

*Gallia est omnis divisa en partes tres, quarum unam incolunt Galli, aliam Romani, tertiam ili, qui appellantur "Galli invincibles"...*

La plej granda generalo de la epoko, regonto de la tuta mondo, paŭzis kaj pensis. Post tuta nerompita ĉeno da venkoj, ĉu li konfesu al la mondo sian unusolan malsukceson? Absolute ne! La mondo neniam sciuj pri tiuj damndaj nevenkeblaj gaŭloj! Decidinte, li forstrekis la vortojn kaj surpaperigis novan senkulpigan frazon, malŝatotan de dekoj da generacioj de malfeliĉaj studentoj. Kaj la nevenkeblaj gaŭloj de unu gaŭla vilaĝeto malaperis por ĉiam el la historio...

...ĝis ilin retrovis du francaj geniuloj, Gosciny kaj Uderzo, ĵus antaŭ dudek jaroj. Kaj dum la postaj jardekoj la aventuroj de tiuj nevenkeblaj gaŭloj, aparte de la ĉasisto Asteriks kaj de la menhiristo Obeliks, fariĝis mondfamaj, eĉ pli ol tiuj de la granda Julio mem. Ĉiu scias, ke Asteriks estis persona amiko de Kleopatra...gajnis en la Olimpiko...enkondukis teon en Britujon...eltrovis Nordan Amerikon...kaj ĉiutage sukcesis defendi sian vilaĝon kontraŭ la romiaj invadantoj. Tion li povis fari dank' al iu mistera eliksiro de superpotenco eltrovita de la saĝa druido Miraklomiks.

Nun finfine la unua aventuro de la Malgranda Gaŭlo estas havebla en la Internacia Lingvo; kaj pro tio ni ŝuldas fortan dankon al Delta Verlag en Germanujo, eldonisto, kaj al la Esperanto-Centro en Paderborn, disvendanto. En ĉi tiu rakonto la romianoj la unuan fojon ekkoncias pri la ekzisto de la eliksiro, kaj provas havigi por si la sekreton de la druido. Finfine tiu preparas por ili eliksiron, sed la efekto ne estas tiu atendata...

La libron tradukis tuta internacia tradukrondo, kies nomoj ne aperas sur la titolpaĝo. Lingvan kontrolon faris Auld, Rossetti, kaj Moerbeek. Mi pardonpetas al tiu lasta, ke mi ne konas lian nomon; sed Auld kaj Rossetti per si mem garantias la kvaliton. Tamen iomete ĝenas la ideo, ke mankas francilingva kontrolisto.

La vortludojn oni tre sprite transprenis (ne tradukis) en Esperanton. Unu-du el la angla eldono mankas ĉi tie ("Vae victis!", "I decline!" sur la unua paĝo fariĝas nura "Vae victis!", "Kion li diras?"); sed aliaj, aparte la tuta paĝo da haŝercoj, estas tre lerte esperantigitaj (kaj tie adorantoj de la Majstro rekonos liajn stilon kaj kontribueton al la Asteriks-legendo). Unu kalemburo, rilate la recepton por eliksiro, estas bela ekzemplo de la ŝvarca anagramatiko, netradukebla en la anglan.

Oni tre sukcese gaŭlsperantigis la gaŭlajn nomojn (ekz. Moŝtiks, Malmuziks, Tutaŭtomatiks, Lastaperiks); sed ne plaĉas la tro ofta nespriteco de la romiaj nomoj. Ekzemple, mia kara malnova amiko Centuriestro Crismus Bonus fariĝis ĉi tie Gajus Bonus.

(Sinjoroj Sennomuloj, mi ne volas trudi al via genieco miajn senvalorajn sugestetojn pri estontaj eldonoj de Asteriks, sed...ĉu vi rimarkis, ke en *Asteriks la Legiano* iomete levas la kapon la lingva problemoj??)

...Don Harlow

## RESOLUTION APPROVED BY THE 27TH PLENARY ASSEMBLY OF THE WORLD FEDERATION OF UNITED NATIONS ASSOCIATIONS

Barcelona, 8-13 October, 1979

The Twenty-Seventh Plenary Assembly of WFUNA

1. WELCOMES the negotiations undertaken by the President and Secretary-General with the Universal Esperanto Association;
2. RECOGNIZES that the common internationalism of members of Esperanto Associations and United Nations Associations is a basis for future cooperation;
3. INVITES all United Nations Associations to collaborate with Esperanto Associations in urging educational authorities and organizations in their countries to introduce or expand the teaching of Esperanto.

NOTE: Santa Barbara Chapter of UNA is sponsoring an Adult Education Esperanto Class with the Esperanto Society of Santa Barbara.

Dr. Robert Muller, Secretary of the Economic and Social Council of UN, in an address to the Esperanto Convention of UEA at Lucerne, Switzerland, August 1979, said: "The world needs you. UN needs you."

(from *UN kaj NI* #15)

## NEWS OF ESAA MEMBERS

Prof. Jonathan Pool (Univ. of Washington) is the author, with Thomas Rees, of "Guide to Information Resources in Language Planning" in the May, 1979 issue of *Language Planning Newsletter*.

Prof. Richard Wood (S.E. Missouri State Univ.) has prepared an article "A Voluntary, Non-Ethnic, Non-Territorial Speech Community" due to appear in a volume edited by William F. Mackey and Jacob OrNSTEIN, entitled *Sociolinguistic Studies in Language Contact*. In preparation, Dr. Wood is updating an article "Sociolinguistic Notes on an Unconventional Language Community" and "The English of Esperantists" concerned with usage of English-speaking Esperantists in settings within the Esperanto movement. Prof. Wood's review of M. I. Isayev's "National Language in the USSR: Problems and Solutions" (Moscow: Progress Publishers, 1977), which deals quite extensively with Esperanto, appeared in *Modern Language Journal* (Jan-Feb 1979). A special issue of the *Journal of Communication* (Spring 1979) included his article on "Language Choice in Transnational Radio Broadcasting" which gives some attention to broadcasting Esperanto. The issue was largely devoted to "The Politics of Language."

Eugene Thompson, G. G. Edwards, and Humphrey Tonkin attended the hearing of the President's Commission on Foreign Language and International Studies in Raleigh, NC in April and had occasion to intervene on behalf of Esperanto studies. Other ESAA members attending similar sessions were Bruce Sherwood and R. Kent Jones, who attended the Chicago hearings where they submitted testimony.



**RECENZO:** *Gvidlibro por supera ekzameno kaj Baza literatura krestomatio*

Kiel kaj kie nova lernanto de la internacia lingvo orientiĝu en la esperanta kulturo? Tiun problemon mi mem frontis antaŭ kelkaj jaroj kiam izolate en Mez-Usono, mi komencis legi esperantajn librojn kaj revuojn. Daŭre mi perdiĝis inter amasoj da nomoj de esperantaj pioniroj, aŭtoroj, eminentuloj, kaj organizaĵoj. Feliĉe mi iel malkovris la nesufiĉe konatan sed treege utilan *Gvidlibron por supera ekzameno II* (Budapeŝto, 1966), malimponan 190-paĝan broŝuraĵon kun eĉ pli malimpona kaj nealloga titolo. Destinite prepari hungarojn por ilia supera ekzameno, ĝi tamen enhavis informriĉajn kaj facile kompreneblajn historiajn skizojn pri planlingvoj, kaj ankaŭ pri esperantaj movado, organizaĵoj, kaj literaturo. Poste elĉerpiĝis la unua eldono de la *Gvidlibro II* kaj aperis la grandioza *Esperanto en perspektivo*, kiu celis informi multe pli amplekse kaj oficiale pri ĉiaj facetoj de Esperanto. Fakte, ĉi tiu impona libreto iom timigis, kaj malgraŭ ĝiaj bonaj indoksoj, eble pro mia maldiligento, prefero ol traserĉi ĝin por unuopa informo, mi ne senkutimiĝis konsulti la *Gvidlibro*-n. Cetere, rilate la historion de la esperanta literaturo, la *Gvidlibro* – kun skizo verkita de Kalocsay mem – montriĝis pli helpema kaj ofte pli ampleksa ol *Esperanto en perspektivo*.

Estas do plezuro bonvenigi duan, pli ampleksigitan kaj tute ĝisdatigitan eldonon de la *Gvidlibro*. Ĝi restas tutsame facile kompreneble kiel la unua eldono, sed plue, ĝi nun estas multloke pli riĉigita je pli detalaj kaj novaj informoj. Impresas agrable trovi menciojn pri Valano, Lorjak, kaj *La granda kaldrono*. Tre evidentiĝas, ke la aŭtoroj penas kaj plene sukcesas liveri fidindajn, objektivajn, kaj netendencajn informojn. Kompreneble, ne ĉiuj partoj povas samgrade interesi nehungarajn esperantistojn. Pleje utilas, kiel en la unua eldono, la skizaj historioj pri movado, organizaĵoj, kaj literaturo. Se la informoj pri planlingvoj tro emas fariĝi teda listo da nekonataj nomoj, almenaŭ interesatoj pri ĉi tiu temo ja trovas nomojn por plua esplorado. La mallonga skizo pri la esperanta movado en Hungarujo trovas nur limigitan publikon ekster tiu lando. Kaj ne kontentigas la tute nova aldona parto -metodologio - kiu tro detale kaj tro arbitre pretendas starigi la principojn de Esperanto-instruo en hungaraj lernejoj. Ĉu fakte la fremdlingva pedagogio jam sufiĉe scienciĝas por establi tiom rigide kaj nediskuteble ĉi tiujn "regulojn"? Tion kredigus d-ro Szerdahelyi, la aŭtoro, sed permesu, ke mi dubu. Okazajn konsiliaĵojn profitindajn certe trovas nehungaraj instruistoj, sed ilin ne persvadu la nepreca tono, ke ĉi tiu metodologio estas ia nova instruista biblio aŭ la unusola maniero instrui Esperanton.

La formato kaj aspekto de la nova eldono estas tre malsamaj ol la antaŭaj, sed ĉi tio ne signifas nediskuteblan plibonigon. La preslittero estas ja pli

grandaj, sed aliflanke, la inko tre emas ŝmiriĝi, kaj la interliniaj spacoj foje kapricas. Bedaŭrinde, ankaŭ la nova eldono tro emas disfali kaj ne longe travivos la oftan enmanigon, kiun ĝia enhavo meritas. Sed sen plua ĉikano pri la iom neinda eksteraĵo, mi varmege rekomendu la *Gvidlibro*-n pro ties granda utilo. Ĝi restas la plej facila kaj agrabla kulturigilo por novaj (kaj malnovaj) esperantistoj.

Plua grava novaĵo ĉe la nova *Gvidlibro* estas, ke ĝi nun aperas akompanata de *Baza literatura krestomatio*, aparta, similformata kolekto da eltiraĵoj el la tuta maso de la esperanta literaturo. Ankaŭ ĝi havas kaj meritojn kaj mankojn. Ni ŝuldas dankon al Vilmos Benczik, kiu akceptis entrepreni tian kompilon. Jam ekzistas ja la poezia antologio de Auld kaj la *Tridek tri rakontoj*, sed ĝis nun ne ekzistas moderna provo kolekti la plej bonajn tekstojn el la tuta esperanta literaturo (inkluzive tradukojn!) en tiom malgranda formato. Krome, ni memoru, ke la kompatinda Benczik devis ilustri per siaj elektaĵoj la literaturhistorian skizon en la *Gvidlibro*, kiun ne li verkis. Longe oni povus pridiskuti, kompreneble, por decidi kiujn aŭtorojn, verkojn, kaj unuopajn eltiraĵojn oni devus enmeti. Benczik kuraĝis efektive elekti, kaj la rezulto estas certe ĝisdata kaj plejparte reprezentiva.

Mi tamen ne komprenas, se la *Krestomatio* aparte destiniĝas akompani la skizojn en la *Gvidlibro*, kial Benczik ne provas sekvi ties prezent-ordon en la *Krestomatio*. Ĉiujn verkistojn menciatajn en la *Gvidlibro* li ja ilustras per tekstoj en la *Krestomatio*, sed laŭ tute alia ordo. Oni devas do daŭre konsulti du indoksojn por kunigi la informojn pri aŭtoro kaj ties verkaĵoj; la *Krestomatio* mem enhavas nenium priverkistan eksplikon.

Alia demando rilatas la intereson, kiun povas havi mallonga projaĵo, ekz. 4-paĝa ĉapitrero el detektiv romano, prezentita ekster la kunteksto de la tuta verko. Benczik ja atentigas, ke temas ne pri antologio sed pri krestomatio, t.e., kolekto da tekstoj por studoj, supozeble prilataj. Tiukaze, oni tamen rajtas plendi pri la nekarakterizecon de kelkaj elektaĵoj.

Kion do pensi pri tia *Krestomatio*? Ne tre utila memstare, ĝi ankaŭ ne kontentige harmonias kun la prezento de la *Gvidlibro*. Tamen ia simila verko estas tre bezonata, kaj ĉi tiun ni nun havas. Konsidere de la malgranda formato kaj tiom da sensolvaj problemoj, mi ne sciuz, kiel oni elektus multe pli bone ol Benczik. Mi nur sugestus, ke ĉe la tria eldono, oni kunmetu en unu volumon la du literaturajn partojn, tiel ke la tekstoj de la krestomatio tuj sekvu la priaŭtorajn informojn. Tia kunmetaĵo de literaturhistoriaj skizoj kaj ilustraj tekstoj eble konsistigus la plej instrueman verkon pri esperanta literaturo.

James F. Cool

[For prices, see list of new books in this issue.]

## RECENZO

Miyamoto masao  
*Sarkasme kaj entuziasme*

Eseoj - eld. La Kritikanto - \$13.95

This is a book that is both excellent and irritating. Excellent, in that its fundamental hypothesis -- or what I see as its fundamental hypothesis -- is a thought-provoking one. Irritating, in that the author has engaged in overkill in an attempt to prove it, and gone beyond the realm of pure fact into that of fancy.

The book is a collection of essays divided into six sections: "Lingvo, kiu deziras esti interpopola"; "Literaturo, ĉu ne eblus en Esperanto"; "Arto versi japaneske"; "Inter idealo kaj realo"; "Recenzo, se tiel nomi"; kaj "Kritiki, aŭ silenti".

The essays are generally short, with a few exceptions (e.g., "La ebleco de internacia literaturo en Esperanto, kaj ĝia nuna stato en Japanio"), and they are eminently readable -- long enough to be informative, short enough not to grow tedious. The very few grammatical errors I noticed in the book could as easily have been the fault of the typesetter as of the author; I shall not enumerate them, since that sort of thing is one of the sins for which Miyamoto (rightly) takes reviewers to task.

The meat of the book seems to me to lie in the first and third sections. Miyamoto's fundamental hypothesis seems to me to be the following: Esperanto is intrinsically, and through its cultural history, extrinsically a pan-European language, rather than an international or worldwide language. The current attitude of Esperantists speaking European languages is not likely to change this in the future.

As far as the first part goes, it is here that Miyamoto engages in overkill and some downright distortion. He may not be aware of the work of some linguists more recent than the last edition of the "Plena Gramatiko de Esperanto" who have shown that not only is Esperanto more similar to Japanese than to the Indo-European languages in its word-formation, but that in its morphology it is more similar to Chinese than to any European language or Japanese. In one article, "Pri 'la'", the author points out the difficulties of the definite article, which "...mi, kiu eklernis la lingvon jam de antaŭ 45 jaroj ankoraŭ ne povas facile manipuli..." To do this, he calls upon the rules for the use of "la" given by Kalocsay and Waringhien in *Plena Gramatiko*, not mentioning that these rules should be considered as descriptive of the usage of the article (in the 1930's!) and that only Zamenhof's original, simple rule should be considered as prescriptive. Furthermore, he states at the end of the essay that "...se la aŭtoro de Esperanto estus japano, li sendube ne konsiderus enkonduki la artikolon en la lingvon." That Zamenhof's native tongue was just as article-less as Japanese, Miyamoto fully realizes (see the essay "Pri la editorado de 'La Faraono'").

After saying all that, I may add that from my own experience I can safely say that Esperantists of the United States at least are more or less oblivious to the Japanese culture as it is accessible through Esperanto. I find it absolutely fascinating to see how many Japanese Esperanto books our book service carries in stock, many of them of very high quality, ranging from Kawabata's *Neĝa Lando* to the excellent translated anthology of prose *El Japania Literaturo* through numerous books of poetry to Miyamoto's own *Naskitaj sur la ruino* -- and how long those books sit on the shelves gathering dust while around them religious pamphlets and easy readers and short detective novels sell like hotcakes.

Donald Harlow

**Spokane, WA - ELNA TAPE LIBRARY** - Ken Ver Ploeg announces receipt of new recordings from Swiss Radio (always high quality) and from Prof. Duc Goninaz (France). Tape borrowers should send a minimum of \$2 to Mr. Ver Ploeg, depending upon the complexity of their requests.

## ELNA BOOKSERVICE - NEW OFFERINGS - CHECK THESE!

□□**Blanke** (red.): *Sociopolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado*. Broŝurita. \$9.00. 228p. Historio, fono, perspektivoj de la Esperanto-movado el socialisma vidpunkto.

□□**Böll**: *La perdita honoro de iu Katarino Blum'*. Bindita. \$9.85. 154p. Juna virino suferas pro ĵurnalistoj. Romano verkita de Nobel-premiito.

□□**Jung**: *Ĉiu-Ĉiun*. Broŝurita. \$32.50. 400p. Anekdotata biografio de konata esperantista eldonisto kaj redaktoro (fondinto de *Heroldo*).

□□**Miyamoto**: *Sarkasme kaj entuziasme*. Broŝurita. \$13.95. 151p. Pikaj eseoj pri esperantistaj temoj fare de unu el la plej gravaj Esperanto-stilistoj.

□□**Potts**: *Poezia bukedo*. Broŝurita. \$6.25. 102p. Leĝeraj poemoj por geknaboj. Bele ilustrita libro.

□□**De Diego**: *Pri Esperanta tradukarto*. Broŝurita. \$6.50. 71p. Prelegoj pri la malfacilaĵoj de esperanta traduko, fare de la tradukinto de *Don Quijote*.

□□**Neergaard**: *La esperantologio kaj ties disciplinoj*. Broŝurita. \$3.25. 29p. Represo de klasika diskuto pri la taskoj kaj rezultoj de la Esperantologio.

□□**Martinson**: *Aniaro*. Bindita. \$17.50. 174p. Nobel-premiita epopea poemo pri kosma esplorado. Tradukis ĝin Bertil Nilsson kaj William Auld.

□□**Gabrielli**: *Vivendo*. Broŝurita. \$9.75. 186p. Poemaro, kun kelkaj tradukoj en aliajn lingvojn, de la konata itala esperantista verkistino kaj eldonistino.

□□**Lebrun**: *Leo Tolstoj*. Broŝurita. \$25.95. 402p + xxiii ilustr. Ampleksa biografio de la konata verkisto, reformisto, kaj poeto de la 19a jarcento.

□□**Benczik** (red.): *Baza literatura krestomatio*. Broŝurita. \$9.00. 266p. Kompendio de la plej gravaj prozaĵoj kaj poeziaĵoj de la Esperanto-literaturo. Por uzo kun la *Gvidlibro* (vidu malsupre).

□□**Benczik** (red.): *Gvidlibro por supera ekzameno*. Broŝurita. \$10.40. 358p. Historio de la Esperanto-movado kaj ties literaturo. Por uzo kun la *Krestomatio* (vidu supre).

□□**Soler y Valls**: *Esperanto al Alcance de Todos*. Broŝurita. \$4.25. 115p. Una gramática fundamental, con ejercicios, de Esperanto para los que hablan Español.

□□**Knichal**: *Komenio kaj la internacia lingvo*. \$1.20. 16p. Pamfleto pri la sinteno de la granda ĉeĥa filozofo rilate la internacilingvan ideon.

□□**Bezuĉ**: *Sileziaj kantoj*. \$2.40. 124p. Poemkolekto, en traduko, de moderna ĉeĥa poeto.

□□**Korytkowski**: *Internacia lingvo en eklezio kaj mondo*. \$8.15. 198p. Sinteno de la romkatolika eklezio al la lingva problemoj kaj Esperanto.

□□**Rados** (red.): *Hund-bazaro*. \$6.50. 68p. Hungaraj poemoj por infanoj en traduko. Enhavas plurajn tradukojn de Kalocsay.

□□**Benczik**: *Libro de romanoj*. \$9.75. 229p. Mallongigoj de ses gravaj fruaj romanoj en Esperanto: *Ĉu li kaj Kastelo de prelongo* de Vallienne, *Paŭlo Debenham*, *Mirinda amo*, *Stranga heredaĵo*, kaj *Pro Iŝtar* de Luyken.

□□**Privat**: *Historio de la lingvo Esperanto, Vol. II*. \$4.75. 199p. La historio de la Esperanto-movado, 1900-1927. Klasikaĵo.

□□**Mueller**: *La amo de Danto Alighieri*. \$7.50. 115p. Dramo kvinakta pri la konata itala verkisto de la 13a-14a jarcentoj.

□□**Gosciny & Uderzo**: *Asteriks la Gaŭlo*. Bindita. \$7.00. 48p (grandformataj). La mondkonata heroo obstine defendas sian hejmlandon kontraŭ la feraj legioj de Romio.

Enclosed is \$ \_\_\_\_\_ for  new  renewal membership in ELNA for the year 1980.  
 Enclosed is \$ \_\_\_\_\_ as my tax-deductible donation to ELNA.

NAME \_\_\_\_\_ Name and address of each new member published  
 in *ELNA Newsletter* and next edition of the  
 ADDRESS \_\_\_\_\_ *ELNA Adresaro* unless member indicates other-  
 wise.

CITY, STATE, ZIP \_\_\_\_\_

**Check correct category:**  Regular (\$18)  Family (\$27)  Youth (18 or under) (\$7.50)  
 Student (fulltime, 25 or under) (\$7.50)  Senior (renewal only, 65 or over) (\$10.00)  Life (\$360)  
 (Note: Life membership payment received before Dec. 31, 1979 will be accepted at old rate of \$300.)

DATE OF BIRTH (If applying for Youth, Student, or Senior Membership) \_\_\_\_\_

Telephone Number: Area Code [ ] \_\_\_\_\_ Radio Call Sign \_\_\_\_\_  
 May we publish your telephone number in the *ELNA Adresaro*? \_\_\_\_\_ May we publish your  
 address? \_\_\_\_\_



Photo shows the Santa Barbara County Court House of Spanish-Moorish style. (Chamber of Commerce photo)

**15th Annual All-California Esperanto Conference 28-30 March 1980 – El Encanto Hotel, Santa Barbara**

El Encanto Hotel, overlooking the city and the ocean, welcomes our 1980 state conference with such amenities as individual cottages, solar-heated swimming pool, color TV, tennis courts, indoor and outdoor dining, wood-burning fireplaces. Always a lively event, this All-California Esperanto Conference will be equally challenging.

# Esperanto League for North America

P.O. Box 1129  
El Cerrito, CA 94530  
Usono/USA



Nonprofit Organization  
U.S. POSTAGE  
**PAID**  
Berkeley, CA  
Permit No. 330

## NEWS - PLEASE EXPEDITE

Address Correction Requested  
Return Postage Guaranteed



### NOTE NEW ELNA DUES FOR 1980

Individual Member	\$18.00
Family membership	27.00
Youth member (under 18 yrs)	7.50
Student member (under 25 yrs)	7.50
Senior member (65 or over)	10.00
Life Membership	360.00

*NOTE: Until December 31, 1979, Life Membership may be purchased for only \$300. Take advantage of this!*

**PLEASE IMMEDIATELY NOTIFY THE ELNA CO OF ANY CHANGE OF ADDRESS OR TELEPHONE NUMBER.**

### ABONU AŬ REABONU

La Ĉinan Monatan Gazeton en Esperanto

## EL POPOLA ĈINIO

#### Abonprezoj:

por 1 jaro	\$3.00
por 2 jaroj	\$4.50
por 3 jaroj	\$6.00

**KLUBOJ!** Varbu amase abonojn aŭ reabonojn al *El Popola Ĉinio* inter viaj klubanoj, kaj rekompence ricevu el Ĉinio memoraĵon kun ĉina stilo!

**SPECIALE por fruaj abonantoj:** Tiuj, kiuj abonas aŭ reabonas antaŭ la 31a de januaro, 1980, ricevos rekte el Pekino grandan kalendaron de 1980. Ne perdu ĉi tiun oportununon!!

Sendu abonpagojn al la loka peranto:  
ELNA CENTRA OFICEJO  
BOX 1129  
EL CERRITO, CA 94530

Specimeno kaj Abonvarbilo Senkoste Akirebla Laŭpete

### ESPERANTO CALENDAR 1980

2-9 January	22nd Australian Esperanto Convention, Sydney
28-30 March	15th Annual All-California Esperanto Conference, Santa Barbara
23 June-11 July	San Francisco State University Esperanto Courses - 3 levels, 3 units [see note below]
12-15 July	All-Americas Esperanto Convention San Luis, Argentina (cooperating with Organization of American States)
15-24 July	Pre-Convention Boat Excursion Seattle-Alaska
26-29 July	All-Pacific Lands Esperanto Conference, Vancouver, BC (ELNA and Canadian Esperanto Assn., hosts)
2-9 August	65th World Esperanto Convention, Stockholm

*Note: High school and college students who successfully complete the national Esperanto examination may be considered for scholarships for ADVANCED ESPERANTO study at San Francisco State University.*

### 1980 TARIFF FOR UEA

Member - Yearbook (MJ)	\$11.20
Member - Subscriber (MA)	28.00
Societo Zamenhof (additional)	56.00
Subscription only to <i>Esperanto</i>	16.80
Subscription only to <i>Kontakto</i>	8.40
Life Membership in UEA	700.00
<i>UN Kaj NI</i>	5.60
<i>Esperanto Documents</i> (English or Esperanto)	14.00

UEA Memberships or subscriptions may be sent either to ELNA, Box 1129, El Cerrito CA 94530, or to UEA Chief Delegate for USA Bonnie Helmuth, Box 2615, La Jolla CA 92038. Payment made to ELNA may be combined with book orders or ELNA memberships for your convenience.